

# Eŭropa Bulteno

marto 2006, № 3 (45)

*De la redakcio...*



## ENKETO....

Hodiaŭ matene mi trovis 3005 poresperantajn voĉojn (52.5%) sur la enketilo de la aŭstria ĵurnalo Der Standard <http://derstandard.at/?url=/id=2375931> ...

La demando estas "Welche Sprache ist am wichtigsten? (Kiu lingvo estas la plej grava?)

Vi povas voĉdoni, se Vi enskribas en la rubrikon "Suche" la vorton "Sprache", kaj poste elektas "Politik" kaj la daton 13.03.2006.

Vi trovos la artikolon "Ansichtssache: Babel in Brüssel" kaj apude, aŭ sube

"Umfrage: Welche Sprache ist am wichtigsten?"

Oni povas enskribi sian opinion. La redakcio scias, ke la subskriboj estas "organizitaj", sed ili almenaŭ povos vidi, ke Esperanto ne estas "hobio de kelkdek verdaj donkiĥotoj"...

**Ludoviko Molnar 30.3.2006**

En la momento, kiam mi finredaktas la Bultenon en la paĝaro estas jam 52,6 % voĉdonoj por Esperanto, kaj 3042 voĉdonantoj.

Voĉdonu ankaŭ vi!

**Printempan saluton kaj agrablan legadon!  
Vesna Obradović**



## XX VINTRAJ OLIMPIAKAJ LUDOJ: MEDALON AL LA ESPERANTO CENTRO DE TORINO



Okaze de la Vintraj Olimpikaj ludoj okazantaj en Torino, Torina Esperanto Centro akiris la patronecon de la organiza komitato TOROC por la produktado de kompak-disko pri esperanto kaj pri la komunaj idealoj inter la lingvo kaj la olimpikaj ludoj.

800 diskojn oni disdonadas al ĵurnalistoj el la tuta mondo.

Krome la Komunumo de Torino tradukis esperant-lingve broŝuron pri la olimpika urbo kies titolo estas, laŭ-litere, "Torino ĉiam moviĝanta".

La kvarkolora broŝuro estas nuntempe disponebla ĉe la olimpikaj kaj urbaj informbudoj.

**Francesco Amerio**

### *La respondo...*

## KOMISIONANO DE EU PRI SCIENCOJ PRI ESPERANTO

Estimata sinjoro Tisljar!

Multan dankon por la letero al la komisionano d-ro Potočnik, en kiu vi invitas lin fariĝi membro de Honora Komitato de Europa E-kongreso, kiu okazos en 2007 en Maribor.

**La komisionano konscias pri la signifo de Esperanto kiel ebla efika ilo por pli bona komunikado en la globaligita mondo.** Pro multnombraj instituciaj kaj aliaj labordevoj en kaj ekster Bruselo bedaŭrinde doktoro Potočnik ne povas akcepti vian inviton fariĝi membro de la honora komitato.

Belajn salutojn akceptu el Bruselo al Maribor,

**Boštjan ŠPORAR**

Membre du Cabinet

Cabinet du Commissaire Janez Potočnik

Commission européenne

09.02.2006



**Janez Potočnik**

## KONTRIBUU POR DVD-FILMO KIUN EEU DISTRIBUOS AL EU-PARLAMENTANOJ

La estraro de EEU estas forte konvinkita, ke ni devas prezenti Esperanton al EU-parlamentanoj kadre de alia lingve ligita eŭropa problemo: neceso krei komunan eŭropan identecon. Eŭropaj politikistoj pli-malpli komprenas, ke EU devas pensi pri tio, kiel evoluigi komunan identecon. Ili konscias ke pro manko de komuna apartensento interalie malsukcesis la propono de Eŭropa Konstitucio. Tamen ili ankoraŭ ne scias kiamaniere krei tiun identecon.

Nun ankoraŭ regas la filozofio de nacia ŝtato laŭ kiu esence ekzistas nur unu identeco, tiu de la nacio. Laŭ tiu filozofio kreo de supernacia identeco damaĝas al la nacia identeco. Kiel esti samtempe germano kaj eŭropano, ĉu eblas esti eŭropano kaj ne damaĝi al sia brita nacia identeco? Pro tiu timo la politikistoj faras nenion por tuŝi la problemon. Certagrade oni konscias ankaŭ, ke identecoj rilatas al lingvoj. Se nacian identecon klare karakterizas nacia lingvo, kiel solvi lingvan situacion rilate al komuna eŭropa aparteno?

Tial ni decidis **PRODUKTI DVD-filmon** sub la titolo **KIA POVUS ESTI EŬROPA UNIO?**

La ne pli ol 20-minuta filmo prezentos E-komunumon: esperanto-kongreson, teatron, koncerton, muzeon, bibliotekon, intervjuon kun verkisto, familian E-renkontiĝon, komitatkunsidon, sciencan simpozion, ttt-ejojn, internaciajn vizitojn, radio-Varsovion...

La filmo montros novan komunumon kun forta propra identeco kaj kulturo, kiu tamen konsistas el homoj de multaj naciaj apartenoj, komunumon kiu malgraŭ forta nova supernacia kohezio neniel ĝenis kaj damaĝis la nacian apartenon de ĉiu el la membroj.

Ni volas krei altprofesian filmon, kiu ne rekte parolos pri Esperanto sed aŭtomate pensigos ĉiun homon ke tia nova komuinumo eblas nur dank al komuna neŭtrala lingvo, kaj el la titolo kaj la filmo oni devus kompreni: eblas Eŭropo kun forta eŭropa apartensento kaj samtempe kun naciaj sentoj, kondiĉe ke por tiu nova identeco oni uzas neŭtralan komunan lingvon, kiu rilatos nur al tiu nova identeco.

Tian DVD-filmon ni intencas post 1 jaro (ankaŭ multo dependas de vi) distribui al ĉiuj EU-parlamentanoj.

Ni kredas, ke tia informo pri Esperanto estos plej eble efika kaj nepre kaŭzos pli da reala interesiĝo pri tia lingva solvo inter la gvidantaro de Eŭropa Unio. Laŭ nia proksimuma pritakso la kostoj por produkti tian filmon kaj poste multobligi ĝin je 1000 ekzempleroj estos proksimume 20.000 eŭroj. La realigon transprenus nia juna internacia teamo en E@I kun pluraj filmprofesiuloj. Ili bezonas ĉirkaŭ 1 jaron por fari tion.

Intertempe ni invitas esperantistaron en EU (sed kompreneble ankaŭ neEU landaj E-istoj estas bonvenaj helpi) esti malavaraj kaj donaci al EEU por la projekto FILMO siajn kontribuadojn:

Ni ĝojos pri ĉiu donaco almenaŭ 50-eŭra. (sendante 50 EUR aŭ pli oni aŭtomate ricevos post la projektofino la DVDn senpage je propra adreso).

**La kontribuon sendu al la konto de EEU: en Belgio: 380-0098148-55**

**Eksterlande: IBAN BE31 3800 0981 4855 BIC BBRUBEBB**

**aŭ al la konto de EEU ĉe UEA: EECE-P**

**Zlatko Tišljarić, sekretario de EEU**

## KUNVENO KUN OFICISTINO DE LA KABINETO DE KOMISIONANO JAN FIGEL

La 10-a de marto mi renkontis oficistinon de la kabineto de Komisionano Figel, italinon el Sicilio kiu jam laboras dum 15 jaroj en la Eŭropa Komisiono. Ŝi estas sufiĉa multlingva, havas edzon kiu estas franclingva belgo, parolas itale kun siaj 3 infanoj, kaj nuntempe lernas la slovakon!

Ni diskutis france dum pli ol unu horo, kaj tute ne kverelis pri la fama piednoto 5, ĉar mi volis konstrui ian pozitivan rilaton kun ŝi, kaj konscias ke kverelo signifus nur fermon de la pordo, kaj nenian gajnon por Esperanto. Ni ĝenerale babilis pri la ĝenerala vivo en Bruselo kaj la laboro por Eŭ, pri lingvoj en Eŭropo, pri la malfacileco de slavaj lingvoj (komparis iom la polan kaj la slovakon), pri la granda problemo de la irlandaj lingvoj (post 85 jaroj de deviga instruado al ĉiuj infanoj de 4 ĝis 17 jaroj ĉirkaŭ 70% malsukcesas lerni ĝin), kaj finfine kaj iom mallonge pri la ebla kontribuo de Esperanto al la plibonigo de la lingvolernado ĝenerale en Irlando, kaj eble en la tuta Eŭropo (ĉar mi opinias ke tiuj 70% de nelingvemuloj troviĝas ĉie, kaj ne nur en Irlando!).

Mi donacis al ŝi

- 1) itallingvan artikolon de Renato kaj Maria Antonietta Pinto de LPLP printempo 2001 pri la lernfaciligaj ecoj de Esperanto, kaj kiel ĝi povas eĉ helpi la pli bonan lernadon de la gepatra lingvo, "Ricadute metalinguistiche dell'insegnamento dell'esperanto sulla lingua materna dell'allunno".
- 2) la belan koloran dulingvan (itala-esperanto) libron de ERA "Gvidlibro de Instruisto pri la Lingva Orientiĝo per Esperanto", 1995.
- 3) Detalojn de la brita "Springboard" projekto, ankaŭ pri la uzo de Esperanto por plibonigi la lernadon de aliaj lingvoj.
- 4) Ekzempleron de mia dulingva (irlanda-angla) libreto de 2001 pri la lingva diverseco en EU, kiu havas gravan parton pri la lernfaciligaj ecoj de Esperanto.
- 5) Fine en Esperanto, 2 paĝojn pri la infana kongreseto en Florenco (en kiu niaj 2 filinoj partoprenos), kun fotoj de la infanoj.

Ŝia sola komento pri Esperanto estis ke "tiu ideo pri lernfaciligaj ecoj taŭgus por esplorado, sed ne en la aliaj programoj. Mi povas kompreni ke Esperanto povus helpi la lernadon de la franca aŭ alia okcidenteŭropa lingvo, sed kiel ĝi povus helpi lerni slavan lingvon?". Al tio mi respondis ke ne la simileco de vortaro gravas, sed la ege regula senescepta kaj klara strukturo, kiu aparte kuraĝigas la malfortajn infanojn, kaj mi iom montris similecojn de Eo kun la aglutinaj lingvoj kiel la hungara kaj turka, kaj kun la izolaj lingvoj kiel la ĉina (ekzemploj "patrineco" kaj "malsanulejo", kiun Claude Piron komparis strukture al la sama vorto en la ĉina). Mi lasis min gvidi de la vortoj de Zamenhof, "paŝo post paŝo", kaj "pacience antaŭen".

La kolegino konsentis ke ni tagmanĝu dum aprilo, kaj daŭrigu la konversacion.

Intertempe mi opinias ke se ni rekomendas al Eŭropaj Esperantistoj skribi al la oficejo de Komisionano Jan Figel, ni rekomendu ke ili ĉiuj substreku la lernfaciligajn ecojn de Esperanto, kaj nur tion, ĉar


- 1) tio estas vera pruvo ke Esperanto ne estas malamiko de aliaj lingvoj, kaj ne celas anstatataŭi ilin;
- 2) tio kongruas kun la nuna celo de la Eŭropa Komisiono plibonigi la lingvolernadon en EU.

3) tio ne estas utopia ideo, sed praktika kaj farebla, kun jam pli ol 80 jaroj de eksperimentoj malantaŭ ĝi.

4) se niaj demandoj estas nerealismaj, ni nenion ricevos. Nia unua celo estu "eta, sed konkreta progreso".

**Seán Ó Riain, prezidanto de EEU**

## NOVA MULTLINGVA STRATEGIO



**Jozef Reinart**

La 10an de marto mi partoprenis la konferencon organizitan de la Eŭropa Komisiono DG Interpretation pri la temo 'Nova multlingva strategio' por reprezentantoj de universitatoj kaj aliaj institucioj. Dum la konferenco faris enkondukon de la komunikita dokumento 'Nova kadra strategio por multlingvismo' Jan Figel, EU komisionano por multlingvismo, mallonge prezentis vidpunktojn Marco Benedetti, Ĝenerala direktoro de interpretado, Karl-Johan Lonnroth, Ĝenerala direktoro de tradukado kaj Olga Cosmidou, direktoro de interpretado en Eŭropa Parlamento.

Pro la limigita nombro de partoprenantoj de la konferenco estis aranĝita televida perado al universitatoj en EU. Eble iu el vi rigardis la konferencon, kiu signifis laŭ mia konsidero komencon de esenca diskuto pri la dokumento de la EK kaj lingvaj problemoj ĝenerale.

Du ĉefajn prelegojn, tre interesajn, havis:

Prof. Mirjana Polic Bobic, Universitato de Zagrebo (el la kandidata EU lando) pri la temo 'Multlingvismo kaj universitatoj en Eŭropo hodiaŭ: nova etapo de malnova rilato'. Plej gravaj rimarkoj:

- en pasinteco en Aŭstro-Hungario (multetna kaj multkultura) multlingveco estis fenomeno,
- dominado de unu lingvo subpremas multlingvismon,
- oni bezonas studi lingvojn de najbaroj kaj malgrandaj lingvoj por pli bone kulture interkompreniĝi,
- nuntempa lingva politiko produktas eŭropajn elitojn!
- Latina lingvo estis komuna lingvo en la 16a kaj 17a jarcentoj, ne subpremis aliajn lingvojn kaj multlingvismo estis realaĵo!

Prof. Svetlana Carsten (rusino edziniĝita al anglo), Universitato de Leeds pri la temo 'Tendencoj de lingva edukado en Granda Britio (GB) en la konteksto de multlingvismo':

- la angla estas vaste uzata fremda lingvo,
- lernejoj en GB estas arogantaj al lingva instruado,
- lernejoj havas malfacilaĵojn partopreni en universitataj interŝanĝaj programoj (sendi studentojn en aliajn landojn, ĉar mankas studentoj kapablaj partopreni en la programoj),
- la aprobo de la lingva leĝo en 2002 en GB laŭ kiu studentoj pli aĝaj ol 14 jaroj ne devas studi fremdajn lingvojn kaŭzis en jaroj 2003 – 2005, ke malkreskis intereso de studentoj studi fremdajn lingvojn je 51 procentoj,
- tiun ĉi staton kaŭzas dominado de la angla,
- GB bezonas plialtigi gravecon de lingva studado, ĉar la lando ne preparas lingvajn fakulojn,

- la situacio estas alarma! Kiel eblas ŝanĝi negativan tendencon?

En diskuto ŝi ankoraŭ diris:

- al studentoj mankas sento de sukceso studi fremdajn lingvojn,
- la registaro de GB devintus rekonsideri la decidon, leĝon de 2002 kaj denove fortigi studadon de fremdaj lingvoj,
- universitatoj de GB devintus fortigi premon al la registaro por ŝanĝi la lingvan leĝon, ĉar la monolingvismo finiĝis kaj ekas multlingvismo,
- nivelo de lingvokono de la angla en universitatoj de GB estas pli alta ĉe eksterlandanoj ol ĉe anglaj denaskuloj!

Tiuj ĉi prelegoj vere trafe prezentis lingvan situacion en EU kaj al kritike kontribuis al la prezentita dokumento de EK kaj lingva situacio ĝenerale. Dum la konferenco estis prezentitaj kritikoj, sed ne estis prezentitaj novaj ideoj, proponoj por solvoj, alternativoj, ktp.

Dum la paŭzo mi kontaktis ambaŭ profesorinojn kaj gratulis al ili al iliaj prelegoj kaj kritikaj rimarkoj. Mi donis al ili konkludojn de Nitobe Simpozio en Vilno en kiu estas ankaŭ la retadreso de la simpozio. Krome mi informis prof. Carsten pri similaj spertoj en Irlando kun instruado de la irlanda kaj mi donacis al ŝi la prelegon de Sean, kiun li havis en Londono la 17an de februaro.

Mi mencias almenaŭ kelkajn plej ĉefajn komentoj de partoprenantoj:

- lingva instruado devas fariĝi politika prioritato, membrolandoj bezonas politikan solvon por subteno de multlingvismo,
- oni devas akcenti devas kvaliton de lingva edukado kaj kono,
- kiel ŝanĝi tendencon al unulingvismo kaj subteni evoluon de multlingvismo, ke civitanoj lernu regionajn lingvojn, lingvojn de novaj membro ŝtatoj?
- kiel instrui lingvojn parolatajn en familioj (neoficialaj lingvoj de EU, lingvoj de enmigrantoj, ktp.)?
- krei reton por oferti lingvojn por studado,
- anstataŭ studado de eŭropaj lingvoj por pli bona kultura interkompreniĝo aktualas en GB tendenco studi la ĉinan, lingvon de la estonta grandpotenco,
- al tio reagis Marco Benedetti, ĝenerala direktoro de EK, ke EU-membrolandoj devintus instrui kaj prepari instruistojn, interpretistojn/tradukistojn de novaj EU membroj, la rumanan, bulgaran estontajn membrojn kaj la turkan sed ne la ĉinan, kiel okazas en GB.
- li proponis, ke universitatoj specialiĝu en studado de fremdaj lingvoj,

Prof. Forstner, prezidanto de CIUTI (Internacia konstanta konferenco de universitataj institutoj de tradukado kaj interpretado) el Germanio diris:

- estas bezono klare difini kian multlingvismon EU volas promocii kaj subteni,
- gravas lingva egalrajteco kaj subsidiareco,
- universitatoj ne havas liberecon decidi, kiujn lingvojn povus instrui por fortigi multlingvismon, ministerioj ordonas/atribuas, kiujn lingvojn devas universitatoj instrui,
- bezonata estas pli proksima kunlaboro de institucioj por multlingvismo,
- akcenti kvaliton de lingvoinstruado,
- serĉi multlingvajn solvojn,
- kia estas atraktiveco de fremdaj lingvoj por studentoj?
- pro kio estas unu pli interesa ol alia?
- fakuloj devintus enpensiĝi, kiel ŝanĝi la negativan situacion.

Dum paŭzo mi havis eblecon mallonge paroli kun prof. Forstner, doni al li la konkludojn de Vilno kaj krome la anglo-esperantan version de la Konstitucia Traktato de du ĉapitroj.

Antaŭ la fino de la antaŭtagmeza programo, kiu jam estis plilongigita, Marco Benedetti subite informis, verŝajne kiel reago al multaj kritikaj rimarkoj, ke venis mesaĝo kun propono de iu (kiu sekvis la konferencon en iu universitato), ke Esperanto povus esti relea/ponta (pivota) lingvo en interpretado en EU institucioj. La partoprenantoj en la salonego eksusuris, kelkaj ekridis. Pro certa malkoncentriĝo kaj bruo en la salono, reagoj de miaj kunsidantaj partoprenantoj kiuj turniĝis al mi, ĉar mi parolis kun ili pli frue pri Esperanto, ŝajnas al mi, ke li diris tion, ke Esperanto ne estas viva lingvo aŭ io simila, kion kutime diras EK. Sed unu partoprenantino, mi ne scias kiu ŝi estis, subite reagis, ke Esperanto ne havas kulturon. Ne estis ebleco identigi ŝin en la salonego, kie ŝi sidis.

Antaŭ la tagmanĝa paŭzo jam ne estis ebleco reagi al tiuj mallongaj negativaj komentoj. Mi opiniis, ke tiam ne havis sencon reagi kaj komenci klarigi konatajn faktojn pri Esperanto, ktp., kaj eble kvereli kun kelkaj partoprenantoj.

Mi tuj post la fermo de antaŭtagmeza programo iris al prof. Forstner kaj donacis al li la dokumentojn, ĉar li, kiel prezidanto de CIUTI) estis rekonita kaj respektita personeco en la salonego. Post mi parolis kun kelkaj partoprenantoj kaj informis ilin pri la Nitobe Simpozio en Vilno kaj donis al ili konkludojn.

Kiel vi vidas el miaj rimarkoj la diskuto iris direkton, kie ni vere volas ĝin havi, ke oni komencu esencan fakan kaj politikan diskuton pri lingvaj demandoj kaj problemoj kaj iom post iom gvidi ĝin al diskuto pri kadro de konstruiva kaj realisma lingva politiko de EU.

Kiel reago al miaj materialoj donitaj al prof. Forstner, prezidanto de CIUTI, venis al mi informo kaj invito partopreni en Ĝenevo tre interesan konferencon, kiun (malgraŭ mallonga tempo) mi klopodos partopreni. Ĝia temo 'Lingvoj en ŝanĝiĝanta mondo – inter lingvaj homaj rajtoj kaj ekonomiaj bezonoj de internacia komunikado' estas tre aktuala kaj en la programo estas konataj prelegantoj.

**Jozef Reinvart**

*Oni skribas...*

---

## **ARTIKOLO EN LA NACIA FAKA REVUO PRI ESPERANTISTA FAKA ASOCIO**

En la februara numero de GRADBENI VESTNIK (Konstruista heroldo), organo de Asocio de slovenaj konstruĝenieroj, estis publikigita tutpaĝa artikolo pri TAKE (Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistoj). Ĉefredaktoro de la revuo petis min pri tio dum nia korespondado pri mia traduko de artikolo de mag. Marko Završki (unue publikigita en la monata revuo Gradbeni vestnik) por TAKE. Al la teksto estis aldonitaj fotoj de la fruntpaĝo kaj enhavpaĝo de la JARKOLEKTO de TAKE 2006.

**Đorđe Obradović**

***Iomete alie...*****NI MALLIBERIGAS NIN****Kiel ni lasas Skype, MSN, MSOffice kaj aliajn malliberigi nian mondon. Granda malliberejo**

Homoj ofte ne havas imagon pri tio, kion signifas la uzado de la supre menciitaj programoj. Ĉi tiu artikolo klarigas tion, por ke vi povu fari taŭgan decidon.

Imagu: Vi interkonsetis pri renkonto kun via amatino kaj vi estas iomete malfrua. Vi volas alvoki ŝin per poŝtelefono por ke ŝi ne tro koleru. Vi prenas vian Nokia-an poŝtelefonon kaj subite ideo trafas vin: ŝi havas Siemens-on.... kaj eblas alvoki nur aliajn Nokia-ajn telefonojn per via Nokia-a telefono, ĉar ĉiuj telefonentreprenejoj elpensis siajn proprajn sistemojn. Ŝi certe koleregos!

Kompreneble nuntempe kun telefonoj tio ne okazos. La malferma normo GSM permesas al ĉiuj alvoki ĉiujn. Feliĉe por vi kaj via amatino. Kvankam estas tiel por poŝtelefonoj, ne por ĉioj estas tiel. Kelkfoje entreprenoj posedas iun teknikon, kiu dependigas nin de ili. Se la ĉi-supra ekzemplo estus vero, ni devus aŭ aĉeti pli da telefonoj aŭ ni devus pagi pli por ke la telefono povu iel funkcii per pli da sistemoj (se la aliaj entreprenoj permesus tion) kaj tiel plu. Kompreneble, ofte entreprenoj ŝatas tiun dependecon: ili ja gajnas monon per ĝi...

Kelkfoje homoj miskomprenas kaj pensas, ke io estas oficiala malferma normo. Ekzemple la ofte uzata formato de Microsoft Word. Homoj ofte pensas ke ĉiuj havas ( oficialan/laŭleĝan ) version de tiu programo. Tamen ankoraŭ sufiĉe multe da homoj uzas malnovajn aŭ ne kunigeblajn sistemojn. Eĉ se ĉiuj nun povus legi la dosierojn kreitajn de la aliaj, kio okazus al la 'normo' se Microsoft decidus ŝanĝi la sistemon? Ĝi en malpli ol unu sekundo vaporiĝus kaj ĉiuj kiuj antaŭe povis legi viajn dosierojn, nun devus aĉeti la novan version!

Do... kio estas la diferenco inter malfermaj normoj kaj sistemoj posedataj de iu entrepreno? (kelkfoje ankaŭ 'fermaj normoj')

	<b><i>Malferma</i></b>	<b><i>Ferma/posedata de iu entrepreno</i></b>
disponebleco	Ĉiuj povas legi kaj uzi/realigi ĝin	Permeso de la entrepreno estas bezonata
elektebleco	Maksimuma: ĉar ĝi estas libere disponebla, libera merkato sen limoj povas evolui	Limigita: la entrepreno influas kaj kontrolas la uzadon de la sistemo
tantiemoj	Senpage	Decidataj de la entrepreno (povus ŝanĝiĝi estontece)
diskriminacio	Neniu. Ĉar ĝi estas libere disponebla, neniu povas limigi la uzadon: ĉiuj entreprenoj povas uzi ĝin	Dependas de la entrepreno: ili povas postuli aĵojn/agojn fareblajn ne de ĉiuj
evoluigeblo	Tute libera: se vi havas bonan aldonon, vi rajtas fari/uzi ĝin kaj disponigi ĝin kiel plivastigitan malferman normon	La entrepreno decidos ĉu la ŝanĝoj estas taŭgaj aŭ ĉu ne
estonteco	Sekura	Malsekura, oni neniam scias kion la entrepreno decidos



La avantaĝo de fermaj sistemoj/normoj estas, ke ĉar la rezulto estu profitiga al la entrepreno, indas elspezi monon por reklami kaj disvastigi ĝin. Tamen tiu avantaĝo kompreneble malaperas kiam io jam estas enkondukita al la merkato, nur taŭgas kiam io ankoraŭ estas nova kaj nekonata.

Do kun ferma normo vi estus dependa de iu sola entrepreno. Tio ne nepre estas problemo. Eble la entrepreno nuntempe agas tre bone kaj vi estas tre kontenta pri la nunaj produktoj, ĉar la nuntempaj estroj/gvidantoj havas bonajn korojn kaj faras bonkvalitajn varojn. Vi tamen ne povas esti certa ĉu en la sekva jaro ankoraŭ estos tiel.

Tial por ni kiel la finaj uzantoj povas malfermaj normoj esti gravaj, ĉar ili certigas ke sistemoj funkcii kune kaj ili donos pli multajn kaj pli bonajn kaj pli malmultekostajn produktojn (kvankam komence fermaj sistemoj povus aspekti pli allogaj). Ke la entreprenoj devas interkonsenti pri la normo kaj dividi la enspezojn, ne devus esti problemo! Per malfermaj normoj ni certigas ke se ni ne estas kontentaj pri iu produkto, ni povas mem fari pli bonan version aŭ iu entreprenisto vidas la eblecon kaj faras pli bonkvalitan version.

Por multaj aferoj oni jam interkonsentis pri malfermaj normoj. Sube vi trovas kelkajn preskaŭ ĉiujtage uzatajn malfermajn normojn:

- interreto ( TCP/IP )
- poŝtelefonado ( GSM )
- retpaĝaroj ( HTTP/HTML/XHTML/CSS )
- retpoŝto ( STMP, POP, IMAP )

Nuntempe multe da esperantistoj uzas fermajn sistemojn. Kvankam ili antaŭenpuŝas liberecon kaj egalecon per la lingvo k.t.p., tamen per komputilaj programoj ili faras la kontraŭon ;-). Sube vi trovas kelkajn fermajn programojn, de kiuj eble ankaŭ vi uzas kelkajn, kaj iliajn malfermajn (ofte senpagajn) alternativojn.


	<i>malferma</i>	<i>ferma</i>
oficprogramo	Openoffice (Open document)	MsOffice
tujmesaĝilado*	Jabber/XMPP	MSN, ICQ, YM, AIM
retpaĝmontrilo**	Mozilla (Firefox)	Ms Internet Explorer
reta voĉparolado	Gizmo Project (SIP)	Skype

La decido estas ĉe vi: ĉu vi elektos malfermajn normojn kaj tiel liberecon, sekurecon kaj elekteblecon por la estonteco, aŭ ĉu vi elektos (aŭ daŭre uzos) la fermajn sistemojn?

Reagi al ĉi tiu artikolo: <http://startu.net/artikoloj>

Ligiloj:

- [www.openoffice.org](http://www.openoffice.org)
- [www.jabber.org](http://www.jabber.org) (<http://eo.wikipedia.org/wiki/Jabber> )
- [www.mozilla.com](http://www.mozilla.com)
- [www.gizmoproject.net](http://www.gizmoproject.net)



\*Ankaŭ en Esperantio okazas ke entreprenoj adaptas kaj antaŭenpuŝas fermajn sistemojn. Ekzemple ĝangalo.com uzas ferman babilejon dum babilejo.org estas la sola vera Esperanta kaj malferma babilejo, atingebla per iu ajn jabber-ilo. Plue ĝangalo reklamas Skype-on kvankam ekzistas tute libera, senpaga kaj malferma alternativa normo: SIP (uzata per ekzemple gizmoproject)

\*\* Microsoft ofte misuzas sian grandecon por ne uzi la normojn, kiel tio estis priskribita, kaj tiel malfaciligas la disvastiĝon de la vera normo.

**Jordi Haaman**

---

## Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

**Finredaktita: la 31-an de marto 2006.**

**Redaktorino: Vesna Obradović.**

**En la numero kunlaboris: Ludoviko Molnar, Seán Ó Riain, Zlatko Tišljarić, Francesco Amerio, Jozef Reinvart, Đorđe Obradović, Jordi Haaman kaj Vesna Obradović**

**Leterojn kaj komentojn sendu al la serretario de EEU: [zlatko.tisljar@azm-lu.si](mailto:zlatko.tisljar@azm-lu.si)**

**Kontaktoj: [komunikadcentro@esperanto.org](mailto:komunikadcentro@esperanto.org) kaj [vesna.obradovic@email.si](mailto:vesna.obradovic@email.si)**

**Retpaĝo: <http://www.lingvo.org>**